

Lingvistiko pravigas Zamenhof

Claude Gacond, 208-a radioprelego, 1967.10.04 & 1967.10.07

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Post trimonata interrompo ni revenas al la sistema studo de la disvolviĝo de la esperanta movado. Dum prelegaro ni provos malkovri, kio karakterizas nian lingvon de la ceteraj naciaj lingvoj kaj de la konkurence proponitaj internaciaj lingvoj.

A.- Zamenhof apartenas al tiu malofta homa kategorio, kiu ne nur fotografie rigardas al la naturo, sed – permesu la esprimon - kapablas radiografie percepti la leĝojn regantaj la naturfenomenojn.

Cl.- Lia meditado pri la lingva fenomeno kondukis lin al intuicia malkovro de gravegaj leĝoj pri la vortformado, gramatikaj funkcioj kaj rilatoj inter la lingvaj eroj. Neniam Zamenhof provis teoriojn pri tiuj trovitaĵoj. Lia zorgo estis ilin enkarnigi en literaturon. Liaj posteuloj, kiam ili sentos la bezonon, povos retrovi lian penson per atenta studo de lia lingvouzo kaj verkaro.

A.- Dum teorumado kondukas al iluzioj kaj fantaziaj konkludoj, eksperimentado sole ebligas alproksimiĝi al la realeco. En la tempo de Zamenhof lingvistiko estis naskiĝanta scienco, kiu ĉefe okupiĝis pri klasigo de la homaj lingvoj laŭ fonetikaj kaj morfologiaj kriterioj. Eksperimentado ĵus estis montrinta al Zamenhof, ke lingvojn ne karakterizas fonetiko kaj morfologio, kiuj estas kvazaŭ la eksteraĵo de la lingva fenomeno, la vestaĵo, sed ke lingvojn karakterizas la internaĵo observebla en la sintakso kaj stilo.

Cl.- Vortoj estas la brikoj, dum sintakso estas la cemento, kiu permesas konstrui la domon. Tion la moderna lingvistiko bone komprenas. Sed tiu scienco en la pasinta jarcento havis jam sufiĉe da laboro por malkovri la parencecojn ekzistantajn inter multaj eŭropaj kaj la sanskrita lingvoj por kapabli vere interesiĝi pri sintaksaj kaj stilaj problemoj. Zamenhof havis klaran komprenon pri la distanco ekzistanta inter liaj intuiciaj malkovroj kaj tiuj de la tiama oficiala lingvistiko. En bona pedagogo li evitis paroli pri tiu temo.

A.- Tio ne signifas, ke li ne interesiĝis pri la laboroj de la lingvistiko : la malkovro de la hind-eŭropa komuna vortaro. Tiam famiĝis la studoj de la dano **Rasmus-Christian Rasko**, de la germanoj **Franz Bopp** kaj **Friedrich-Karl Bruggmann** kaj de la franco **Michel Bréal**. Ĉiu publika biblioteko posedis la ĉefajn verkojn de tiuj lingvistoj.

Cl.- Zamenhof ne povis bazi sian lingvon sur komparado de vortoj kaj plej internacia vortaro. Por li vortoj kaj gramatikaj formoj naskiĝas, disvolviĝas kaj mortas. Ili estas la rezulto de pli profunda realeco. La lingvoj ŝajnis al liaj okuloj kvazaŭ sociaj institucioj. Tiuj institucioj posedas siajn proprajn evolufortojn. La tasko de lingvo-kreanto estas observi tiujn evolufortojn por povi ilin servi. La sopiro al universala supernacia lingvo reprezentis por Zamenhof la pruvon, ke unu el tiuj institucioj emis naskiĝi. Al li krei la favoran cirkonstancaron ebligantan tiun naskiĝon. Poste al li akceli la kreskadon de tiu institucio, ĝis kiam la forto de inercio ĝin protektos kontraŭ la eksteraj intervenoj de teoriemaj diletantaj kleruloj aŭ lingvistoj.

A.- Oni devos atendi 1916 ĝis kiam similaj konceptoj disvastiĝos en lingvistiko mem per la *Kurso pri ĝenerala lingvistiko* de la sviso **Ferdinand de Saussure**. En tiu kurso la lingva fenomeno estas studata laŭ struktura vidpunkto ; la rilatoj inter la diversaj elementoj de lingvo estas pli gravaj, ol la signoj mem, kiuj estas rigardataj kiel arbitraj.

Cl.- En 1947 franca lingvisto **Georges Galichet** publikigos *Eseon pri psikologia gramatiko*, kiu permesos novan paŝon antaŭen. Hodiaŭ la malkovroj de Galichet havas konsekvencojn ĝis

Lingvistiko pravigas Zamenhof
Claude Gacond, 208-a radioprelego, 1967.10.04 & 1967.10.07

en la elementa instruado de la lingvoj. Mi mencias tion por montri la gravecon de la verkaro de Galichet.

A.- Por tiu lingvisto estas la mekanismoj de la sin esprimanta penso, kiuj regas el la interno la mondon de la signoj. Tiu ege abstrakta demonstro estas konkretigita de kelkaj grafikaj simboloj. La esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la instruado de Georges Galichet tuj rimarkas la mirindan paralelismen ekzistantan inter tiu simbolaro kaj la gramatika strukturo de esperanto.

Cl.- De nun, dank'al la progresoj de la lingvistiko oni povas en spirita trankvilo admiri la geniecon de la lingva intuicio de Zamenhof studante sub nova lumigo la lingvon esperanto.

A.- Tiu studo alportas multajn respondojn al ĝis nun ne satigitaj demandoj. Komparo inter esperanto kaj la konkurencaj planlingvoj komprenigas la firmecon de Zamenhof. Li bone konis la vidpunktojn de siaj kontraŭuloj pro personaj aŭ leteraj kontaktoj. En longa letero sendita en 1895 al W. H. Trompeter, li raportas pri sia korespondado kun Waldemar Rosenberger, la aŭtoro de Idiom Neutral. Li povas paroli pri la estonteco kun certeco, kiu ĉiam mirigis liajn kontraŭulojn kaj eĉ liajn adeptojn. Aŭdu unu el tiuj asertoj, kiu difinas la laboron de Rosenberger kaj adeptojn de Idiom Neutral.

Cl.- « Mi kredas, ke iliaj **intencoj** estas noblaj kaj honestaj; sed kontraŭ ilia **agado** mi devas batali, ĉar tiuj ĉi **amikoj** de nia ideo multe pli detruas nian ideon ol ĉiuj plej fanatikaj malamikoj. [...] Per siaj diletantaj eksperimentoj ili ne detruos la aferon, kiu englutis jam tiom multe da seriozaj laboroj kaj oferoj ; sed la estonta historiisto de nia afero eble diros iam pri ili : « Ili faris ĉion, kion ili povis, por detrui la aferon kaj se la afero tamen atingis sian celon, tio ne estas jam ilia kulpo. »

A.- Multaj lingvistoj interesiĝis pri esperanto, sed plej ofte la verkoj de tiuj diletantoj, kiuj hodiaŭ sin proklamas interlingvistoj, kaŝis la veran aspekton de la lingvo de Zamenhof.

Cl.- Hodiaŭ, kiam la distanco inter la realeco esperanto kaj la oficiala lingvistiko estiĝis, oni ekkomprenas la ekzaktan signifon de la respondo de Zamenhof al Karlo Bourlet, kiu petis la ellaboradon de plena gramatiko :

A.- « Ĉar mi laboris super Esperanto grandan serion da jaroj, tial en **mia propra kapo** la tuta lingvo kun ĉiuj ĝiaj nuancoj havas formon tute **difinitan kaj precizan** ; sed se mi volus ĉiujn eblajn nuancojn **klarigi teorie** mi nur malklarigus la aferon kaj terure ĝin malfaciligus. [...] Por la bona disvolviĝo de nia lingvo estus plej necese, ke mi forĵetu de mi ĉian alian laboron kaj ke mi dediĉu mian tutan tempon nur al tradukado, verkado, verkado kaj tradukado. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-